


KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

NUMERO 322 (88) KVINA EPOKO

MAJO-JUNIO 2002



LA KONGRESURBO ATENDAS NIN!

ASSOCIACIÓ
CATALANA
D'ESPERANTO



KATALUNA
ESPERANTO-
ASOCIO

Apartat, 290 - 08200 - SABADELL
CATALUNYA - KATALUNIO

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio
per n-ro 5785

Kolektiva membro de Literatura Foiro Kooperativo
Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj
Internacie (ne) Agnoskitaj)

Peranto de: UEA (revuoj *Esperanto*, Kontakto kaj libroj), FEL
(revuo *Monato* kaj libroj), IKEL, *Literatura Foiro*, *Heroldo*, *La
Kancerkliniko*, *La Ondo de Esperanto*, *Litova Stelo*, *Scienca
Revuo* (ni peras. ankaŭ aliajn revuojn)

Apartat/Poŝtkesto 290-08200 SABADELL (Vallès Occidental)
Catalunya/Katalunio Tel.93-710 96 36 Fakso: 93-716 36 33

Ret – adreso: kea@esperanto-ct.org

Ret – paĝo: <http://www.esperanto-ct.org>

Kotizoj por la jaro 2002: Individua Abonanta Membro 25
eŭroj; Individua Subtenanta Membro 50 eŭroj; Individua
Dumviva Membro 500 eŭroj; Kolektiva Membro 50 eŭroj;
Juna Membro 16 eŭroj.

Banko: Caixa d'Estalvis i Pensions de Barcelona – Agència
461 Sabadell, Kontonumero: 2100 0461 90 0200055053.

Plenumkomitato de KEA: Prezidanto: Josep Franquesa;
vicprezidanto: Joan Inglada; kasisto kaj provizora sekretario:
Llibert Puig; komitatanoj: Roger Prieto, Anna Casasús,
Arnald Massanas

Kontrola Komisiono: Sebastià Ribes, Òscar Puig, Xavier
Murcia.

Kataluna Esperantisto: Llibert Puig, Marina Ollé.
Revizianto:

La artikoloj publikigitaj en Kataluna Esperantisto ne nepre
esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj
ĝianome.

Kataluna Esperanto-Junularo: Apartat 32.318 - 08080
Barcelona

Imprès a/Presita ĉe: Prest Graf. Sabadell. Tel. 93 725 50 91
Dipòsit Legal: B-27362 - 1982

31a KATALUNA KAJ 4a TRANSPIRENEA KONGRESO DE ESPERANTO

Programo

Kun bedaŭro ni devas anonci la rezignon
de d-ro Carmel Mallia, pro familiaj kialoj.
Tamen jam konfirmiĝis la ĉeesto de
Aleksander Korĵenkov, redaktoro de la
sendependa internacia revuo *La Ondo de
Esperanto* el Rusio, de la kantisto
Gianfranco Molle el Italio kaj de Visnja
Brankovic, direktorino de la entreprenco
Orbis Pictus el Triesto, ankaŭ en Italio.
Oni antaŭvidas ankaŭ la partoprenon de
nia muzika teamo "Kaj Tiel Plu", la
prezenton de la teatraĵo "*La Balkanikoj*" kaj
la specialan prezenton de elstara loka
folkloro grupo.

Loĝado

Pli malmultekostajn hotelojn oni povas
trovi, ne en la urbo mem, sed en ĝia
haveno, katalune "Port de Sóller",
mendeblajn tra via kutima vojaĝagentejo.

Vojaĝo

Krom nia kolektiva vojaĝo (aviadile kaj
buse) jam anoncita en nia antaŭa revuo kaj
en la kongresa aliĝilo, eblas vojaĝi per ŝipo
(vojaĝdaŭro 7 h. prok) aŭ per katamarano
(vojaĝdaŭro 3'5 h. prok.) kaj la ĝisnunaj
prezoj estas 91 kaj 110 eŭroj respektive
(iro kaj reveno, ĝis/el Palma).
Interesatoj turnu sin rekte al sia kutima
vojaĝagentejo.

REGULARO DUA PREMIO DELFÍ DALMAU

Pro diabla artifiko de la komputila koboldeto
kaj ankaŭ eble pro la ne sufiĉa sperto de la
redaktoro, malaperis la nomo de nia kara
amiko Ludoviko de Yzaguirre el la ĵurio. Mi
petas lian komprenemon kaj indulgon.

Pli ol 900 katalunlingvajn regularojn ni
distribuis al ĉiuj membroj de la Asocio de
Verkistoj en la Kataluna Lingvo (AELC) kaj
ankaŭ trarete al diversaj renomaj revuoj kiel: *El
Temps*, *Illacrua*, *L'Avenç*, *Debat Juvenil* kaj aliaj

KASTELO GREZIJONO

Ni ĵus ricevis la programojn por la ĉi-
someraj staĝoj, okazontaj inter la 6-13
julio, 13-20 julio, 20-27 julio, 27 julio/3
aŭgusto, 3-10 aŭgusto kaj 10-17 aŭgusto.
Interesatoj petu la kompletan programon al
nia asocio aŭ konsultu la kastelan ttt-
paĝon: <http://grezijono.kastelo.free.fr>

BARCELONO

Inter la tagoj 22a kaj 26a de junio okazis en Barcelono la Rotaria Mondkongreso kun prok. 19.000 partoprenantoj. Tiu ĉi solidareca asocio, ŝajne la plej granda en la mondo, havas ankaŭ fakajn sekciojn, inter ili tiu de Esperanto (kiel unu el la plej antikvaj) kun la nomo Rotaria Amikaro de Esperantistoj (RADE) ankaŭ faka sekcio de UEA (vidu paĝon 76an de la Jarlibro).

Partoprenis en la Kongreso nome de RADE, la dana prezidanto Eskil Svane, la franca sekretario Marc Levin kaj geedzoj Grattapaglia el Brazilo, gvidantoj de Fazenda Escola "Bona Espero".

KEA kunlaboris per pruntedono de materialo por la stando de RADE kaj surloka helpo. Geedzoj Grattapaglia laŭ invito de nia asocio prelegis ĉe Unesko-Klubo, sabaton la 22an de junio kaj pri la Rotaria movado kaj pri "Bona Espero" kun prezento de vidfilmo.

CABRIANES (Bages)

La tiea lernejo "Els Pins" okazigis kulturen semajnon dum majo, ĉi-jare laŭ la temo: lingvoj –inter ili esperanto-. Tiucele trarete ili petis nian helpon por traduki la nomojn de pluraj ŝildoj, kiujn ili preparis en 4 lingvoj por distribui tra la tuta lernejo.

CERVIÀ DE LES GARRIGUES

Dum la pasinta majo aperis la elektronika katalunlingva eldono de la libro "Poema d'Utnoa" en heksametroj de nia membro, la poeto Abel Montagut. Temas pri nova versio laŭ la originalo en Esperanto "Poemo de Utnoa", kaj ĝi estas aĉetebla kun presrajto, persona uzo, konsulto, esploro, ktp. al la interreta adreso <<http://eilibros.com>>

LLAGOSTERA

Laŭ la titolo "Alia Mondo Eblas" aperis katalunlingva artikolo de Enric Ramionet en la ĵurnalo El Punt de la 19a de marto, surbaze de intervjuo, kiun li faris al nia tiea membro Josep Virgili (legebla en interreto sur <<http://www.esperanto-ct.org/c/aliamondebblas.htm>>). Ni devas gratuli nian samideanon, ĉar li sukcesis komprenigi al la ĵurnalisto, ke esperanto estas vivanta lingvo, kaj ke ĝian disvastigon valoras la penon.

TARRAGONA

Nia tiea samideano Joan Marimon prezentis atelieron pri Esperanto la 18an de aprilo "Tago de la lingvoj" laŭ invito de la loka universitato "Rovira i Virgili". Partoprenis ĝin 15 homoj al kiuj oni liveris du kajerojn (unu gramatikan kaj alian informan) tre interesajn. Rekomendinda materialo por similaj atelieroj. Ni sincere gratulas nian samideanon pro lia bona agado.

SANT CUGAT DEL VALLÈS

La revuo "Sant Cugat Avui" (februaro 2002) aperigis informon pri la loka Esperanto-Grupo "Jozefo Anglès". Ĝi situis en regula rubriko en la antaŭlasta paĝo, kie ĉiunumere prezentiĝas po kvar urbaj societoj. La revuo estas kolora, grandformata kaj bele presita. Ĝin eldonas la magistrato de Sant Cugat del Vallès (62.000 loĝantoj) kaj senpage distribuas al ĉiuj domoj.

NIA AGADO

VILANOVA I LA GELTRÚ

La tiea Esperanto-Grupo pretigis prezentadon de la Humanitara Organizo ESPERO ĉe la loka Ekskursiva Asocio "Talaia" la 24an de majo. Prelegis Èric Collignon kaj Òscar Puig (legu la ĉi suban raporton de nia estrarano Joan Inglada).

Kutime okazas ĉiuvendrede kulturaj prezentadoj en la sidejo de tiu asocio, do la publiko estas jam al kutimiĝinta al tiaj aferoj kaj la ĉeesto estas minimume certigita. La publiko konsistas ĉefe el membroj de la asocio interesitaj pri la kultura vivo de la asocio kaj de la socio. Ili estas scivolemaj homoj kiuj partoprenas tiajn prezentadojn kiel sociajn aranĝojn, sed ne speciale altiritaj de la taga prezentado.

Tamen, estis tre interesa debato kaj ĉefe demandoj pri la sieĝo de Sarajevo, la familiaj situacioj, la ebleco turismi en Bosnio kaj cetere, de kelkaj ĉeestantoj, kiuj montriĝis sufiĉe informitaj kaj interesitaj pri la afero. Post kelkaj tagoj, iu el la ĉeestantoj komentis ke la maniero kiel estis farita la prezentado, kombino de lumbildoj kaj paralelaj komentoj kaj de Èric kaj de Òscar, montris ke ili bone konas la aferon, la militon, la kaŭzojn, la konsekvencojn kaj la nunan situacion kun bedaŭrinda klara antaŭvido de la estonto, rezultigis unu el la plej interesaj aranĝoj okazintaj en tiu ejo.

Ankaŭ okazis komentarietoj kiuj utilis al mi por malkovri ke en la komarko Garraf ekzistas societo "Taula Comarcal de Cooperació i Solidaritat" TCCS sub la aŭspicio de la "Consell Comarcal del Garraf", kiu kunigas la komarkajn NRO-jn kaj administras la monajn kunlaborojn al la evolulandoj.

Hazarde la antaŭa semajno mi konatiĝis kun la reprezentanto de TCCS en prelego pri la Forumo de Porto Alegre kaj mi pretigis kunlabori kun ili en la organizado de alternativaj prelegoj, sed ĉar mi konis nenion pri ilia agado mi ankoraŭ ne parolis al ili pri *Espero*. Ili kunvokis min al la ordinara kunveno kaj tie mi min prezentis kiel membro de *Espero*, de *Elkarri*, de *Baza Renta Reto* kaj de *KEA*.

En la kunveno estis prezentita kunlabora projekto de "Llunàtcis en Acció" NRO, kiu agas en Gvineo kaj ĉiuj aliaj NRO-oj petis klarigojn kaj oni decidis ŝanĝi iomete la projekton por posta oficiala aprobo kunvene kun la komarkaj amaskomunikiloj. La projekton finansas la kooperativo "Qualitat Promocions".

Oni anoncis interkonsento kun Diari de Vilanova, kio estas bona afero por la rekta publika informado kaj ankaŭ ebla interkonsento kun ADEG (Entreprenista Asocio de Garraf komarko). Oni diris ke nur eblos akcepti la rilaton kun la etikkondutaj entreprenoj.

Mi sugestas ke *Espero* pretigu projekton por la venonta "kurso", do septembre, kaj mi petos enkonduki prezentadon kaj de *Espero* kaj de la projekto, kaj kiam oni akceptos ni devos fari oficialan prezentadon al la "Taula Comarcal de Cooperació i Solidaritat".

80-TAGA MONDVOJAĜO

Jen ne ofta informo, kiun ni petas ke vi legu tre atente. Nia membro Manel Vinyals e La Sènia kun sia amiko Joaquim Marcoval preparas sin por entrepren mondvojaĝon dum 80 tagoj, inspiritaj de la romano de Julès Verne. Jes, vi bone legis, ne temas pri ŝerco, nek pri trompo, temas pri vera informo.

Itinero (vidu mapon sur sekvaj paĝoj)

Ili antaŭvidas foriri la 10an de aŭgusto al Londono kaj de tie ili vojaĝos al Roterdamo por viziti UEA-sidejon, kiun ili atingos laŭplane la 12an de aŭgusto.

Kompreneble la vojaĝon ili realigos per trajnoj, busoj kaj ŝipoj, kiel en la fama romano.

La vojaĝo sekvos tra Francio, Germanio, Hungario, Rumanio, Bulgario kaj Turkio alveninte en Istambulo inter la 15a kaj 16a de aŭgusto. Ili sekvos tra Azerbajĝano, Turkmenio, Uzbekio, Tadjikio kaj Ĉinio tra Urumqui, Turpan, Lanzhou, alveninte en Beijing inter la 20a kaj 30a de aŭgusto. De tie ili saltos al Japanio aŭ Rusio kaj de tie pasi al Alasko, Kanado kaj Usono kaj en Nov-Jorko enŝipiĝi cele al Southampton (Britio) kaj trajne al Londono por fini la vojaĝon ĝuste post 80 tagoj de la foriro.


Vojaĝcelo



Kial niaj amikoj entreprenas tian kolosan vojaĝon?

Ĉefe ĉar ili deziras per tio diskonigi la ekziston de Esperanto kaj samtempe turismi. Tiucele ili petas la survojan helpon de ĉiuj samideanoj por faciligi la kontakton kun la amaskomunikiloj, ĉar kio gravas estas ke la ĝenerala publiko informiĝu pri la utilo de nia internacia lingvo.

Ili interkonsentis kun elektronika ĵurnalo <www.vilaweb.com> por aperigi ĉiutage la vojaĝimpresojn en la kataluna por la neesperantista publiko kaj tion ni devus far ankaŭ en Esperanto en la listoj kataluna, eŭropa kaj aliaj internaciaj. La aventuro valoras la penon kaj estas bona okazo por diskonigi ĝin per ĉiuj eblaj rimedoj.

Postvojaĝe nia samideano antaŭvidas la verkadon de libro en la kataluna kaj Esperanto kun la celo donaci la eventualan vendoprofiton al la movado. Liar malavarecon ni dankas kaj gratulas.





KUNLABORAJOJ

Jen nia brusela homo

Jen nia brusela homo: pere de li ni havas piedon en Bruselo, diris nia KEA-kasisto Llibert Puig kiam prezentis la preleganton Dafydd ap Fergus, kimra ĵurnalisto laboranta en Bruselo, kiu prelegis ĉe Unesko-Klubo pri la temo "Lingva egaleco kaj Esperanto" la 20an de aprilo ĉi jara. Per Eŭropa Esperanto-Unio ni esperas atingi pli bonan rezulton. Ni okupiĝas por la solvo de terura komunikada problemo. Tamen ekzistas grava demando: ĉu ni celas Eŭropon aŭ la mondon? Ni opinias ke Eŭropo povas esti la pordo, konkludas resume sian lucidan prezentadon samideano Puig.

Dafydd, kiu eklernis Esperanton nur antaŭ tri jaroj, komentariis siajn vivspertojn kaj sintenojn rilate la situacion de la lingva diskriminacio antaŭ la ebleco pri la enkonduko de Esperanto. La preleganto sobre pritraktis la aferon. Li parolis pri diversaj akceptoj pritraktante la lingvajn problemojn, kie oni trinkis multan ĉampanon kaj nur parolis pri multlingveco kaj ne pri lingva egaleco, kiel en Unesko-Konferenco Linguapax, kie la diverslandaj ĉeestantoj anglalingve parolis pri lingvaj problemoj.

Li diris ke li ne scias ĉu li estas esperantisto, ĉar nuntempe homoj ne ŝatas esti istoj pri io ajn. Li preferas diri ke li ŝatas: "Esperanto-agadon por lingva egaleco". En Bruselo estas multaj politikistoj kaj politikhelpantoj kun multaj proponoj por "savi la mondon". Por UEA kaj EEU estos malfacile enkonduki Esperanton, pro tiu interna ideo paroli samrajte internacie, malgraŭ tio ke multaj homoj timas la lingvan diversecon. Oni scias ke el la ses mil lingvoj en la mondo, kvin mil naŭcent mortos post kelkaj jardekoj. Abundas paradoksoj kiel tiu de la nederlanda flughavena direktoro kiu forigis la nederlandajn ŝildojn, lasante nur la anglajn, por eviti konfuzon.

Laŭ la dua artikolo de la Homaj Rajtoj, ni esperantistoj ne povas esti diskriminacataj, ĉe lingve, sed ni ne havas monon nek povon por enkonduki Esperanton, kaj ni ne povas fidi je aliuloj ĉar la konceptoj pri la lingva problemo estas tre malsimilaj laŭ la landoj. Ni vidu nur du tute malsimilajn kondutojn: en Nederlando malgraŭ la ekzisto de nederlanda asocio por la protekto de la nederlanda lingvo, la novaj vortoj estas anglodevenaj, aliflanke la germanojneŝatas paroli pri lingva egaleco kaj ilinur kalkulas pri la "grandaj lingvoj" kiam ili devas pritrakti lingvajn aferojn.

En la postenaj konkursoj oni devigas la konkurantojn esti angle denaskaj parolantoj. Eŭropa Komisiono agnoskis ke tio estas diskriminacio. Ili scias ke ili devas eviti lingvajn problemojn sed ne estas evidente ke ili kontraŭbatalas la lingvan diskriminacion. Esploroj por koni la lingvajn diskriminaciojn estas planitaj kaj subvenciitaj; projektoj tiusence estas akceptitaj de la Eŭropa Komisiono. Nia preleganto konkludis ke tie estas pordo por esperantistoj. Ni devas profesiigi tiusence kaj agi kiel Greenpeace aŭ Amnestio Internacia.

En la posta kolokvo oni parolis pri la angla kiel la nuntempa lingvo de scienco, pri SAT, pri la kosto de 70.000 eŭroj formi Esperanto-interpretistojn. Anekdotoj kiel la konstato de la kultura ministro de Ugando pri la geknaboj kiuj ne sukcesas en la lernejo kie oni instruas angle. Li ne konscias ke la homoj devas esti instruataj en la gepatra lingvo. Alia afero kiun oni pritraktas en la Eŭropaj politikaj rondoj estas ke nur la grandaj lingvoj evoluis science kaj teknike sufiĉe por esti kapablaj por interpretistoj kaj kiel ekzemplo la preleganto diris ke en la Sveda Universitato 90 % de la objektoj estas instruataj angle, tiel la sveda malgrandiĝis.

Mi ŝatis la prelegon ĉar Dafydd estas vere realisma, tute senmita kaj tio pripensigas la homojn, almenaŭ min.. Tiel granda demando alvenis al mia kapo: Kio okazos kiam Esperanto estos oficiala lingvo por ĉiuj? Eble tiam ni decidus labori por multlingveco, aŭ ne? Kial do ni ne agas kvazaŭ Esperanto ekestus oficiala Eŭropa pontolingvo?. Ni profesiigu, kiel proponas samideano Fergus, kaj konstatu kio okazos.

Kiel profesiigi? Ni devas fortigi nian movadon pere de unuigo. Ni agnosku nian diversecon. En Esperantio, kiel en la makrosocio estas homoj kun malsamaj pensmanieroj. Tamen ni havas tiun internan ideon "paroli samrajte internacie", tion agnoskite ni ja donas la unuan paŝon protekti samrajte ĉiujn lingvajn speciojn. Kataluna Esperanto-Asocio, statute, nur volas tion. Kial do ĉiuj esperantistoj en Katalunio ne aliĝas al KEA? Mi deziras ke homoj kun antaŭenirigaj ideoj pri tio faru proponojn kaj mi promesas debatigi ilin ĉe la Plenumkomitato. Mi alvokas ĉiujn esperantistojn loĝantajn en Katalunio pripensi la aferon. Ĉu ni ne povas nin idi kiel eŭropanojn kun la celo solvi la lingvan problemon ene de la lingva diverseco?

Se ni konsentas pri tio ni ankaŭ konsentos pri aferoj kiel tiu de la turisma broŝuro de Kataluni, merito kiu apartenas al samideano Martí Guerrero. Pro tio mi profitas la okazon por gratuli lin.

Alia internacia projekto kiu funkcias kvazaŭ Esperanto estus normala kulturlingvo, estas Vikipedio <http://eo.wikipedia.com> kie oni povas legi:

"Bonvenon al la Vikipedio de Esperanto, rete konstruata enciklopedio. Vikipedio ekkomenciĝis nur en novembro 2001 kaj nun havas pli ol 2250 artikolojn. Ni volas havi pli ol 100.000, do ni laboru! Ĉiuj-inkluzive de vi! - povas redakti ĉiun artikolon, korekti lingvajn erarojn, pligrandigi artikolon, skribeti aŭ skribegi. Vidu la oftajn demandojn por lerni kiel redakti paĝon kaj aliaĵojn. Vizitu la paĝon pri lastaj ŝanĝoj por vidi kio estas nova, kaj ne hezitu kontribui libere, ĉar ĉi tio pliboniĝadas. Se vi miras kiomaltkvalita estas la Vikipedio (malgraŭ ke ĉiu ajn povas kontribui) bonvolu legi la respondojn al kritikoj.

La speranta Vikipedio estas sub la GFDL (Permesilo de GNU por Liberaj Dokumentoj). La GFDL estas por dokumentoj simila al GPL por programoj"

Kaj por fini vidu kion diras Don Harlow pri ĝi: *"Mi pensis antaŭ jaroj pri TTT kiel medio en kiu aperigi konstante ĝisdatigitan enciklopedion, sed ne sciis kiel efektiviĝi tion, kaj cetere mankis al mi la tempo; do mi ĝojas, ke iuj aliaj faras tion, kaj cetere en Esperanto."*

Do ni agu normale, internacie, nune nur inter ni, esperante, kaj loke laŭ la landa lingvo. Tiuj kiuj estas devigataj paroli tiujn nomatajn "grandaj lingvoj" pro la laboro, ne tro zorgu ĉar laboro estas ĉiutage pli rara kaj finfine malaperonta afero.

Joan Inglada

EŬROPA FEDERACIO DE VERDAJ PARTIOJ

En sia 3a Kongreso, okazinta en Berlino de la 17a ĝis la 19a de majo 2002, ĝi akceptis rezolucion pri endanĝerigitaj lingvoj, kiun ni sekve reproduktas:

“Konsiderante ke dum la venontaj 100 jaroj, 90 elcentoj de la lingvoj en la mondo estos malaperintaj aŭ preskaŭ malaperintaj, kiel avertis centoj da lingvistoj okaze de la 21-a kunsido de la Rega Konsilantaro de UNEP (Programo de la Unuiĝintaj Nacioj por la Hommedio);

Observante ke almenaŭ 3000 el 6000 lingvoj estas endanĝerigitaj, grave endanĝerigitaj aŭ mortantaj en multaj mondopartoj, kiel agnoskis UNESKO mem dum la lasta Internacia Tago de la Patrino Lingvo kaj ke, laŭ la Ruĝa Libro de UNESKO pri endanĝerigitaj lingvoj, preskaŭ 60 % de la eŭropaj lingvoj estas rekte endanĝerigitaj;

Konsiderante ĉi-rilate ke UNESKO mem, en la rezolucio pri plurlingveca eduko kiun akceptis la 30-a Ĝenerala Konferenco, avertis pri la aktuala minaco je lingva diverseco kiun kaŭzas la tutmondiĝo de komunikado kaj la emo uzi ununuran lingvon, riskante la almarĝenigon de la aliaj grandaj lingvoj de la mondo, aŭ eĉ kaŭzante la malaperon de la malpli uzataj lingvoj, interalie regionaj lingvoj;

Rememorigante ke Klaus Toepfer, la Administra Direktoro de UNEP emfazis ke perdi lingvon kaj ĝian kulturan kuntekston similas bruligi unikan faklibron pri la natura mondo: *se ĉi tiuj kulturoj malaperos, ili kaj ilia intima interrilato kun la naturo estos perditaj por ĉiam*, kaj Atentigante ke laŭ la oficiala organo de UNESKO, el la endanĝerigitaj plantaj kaj bestaj specioj de la mondo hodiaŭ, multajn konas sole iuj popoloj kies lingvoj estas formortantaj. Mortante, ili forprenas kun si ĉiujn tradiciajn sciojn pri la ekologio. En 1992 la Pintokunveno Tergloba de Rio starigis mekanismon por malhelpi malpliĝintajn biodiversecon, Jam nun venis la tempo por pintokonferenco de Rio por pritrakti lingvojn (UNESKO-Kuriero, aprilo 2000);

Konsciante, ke en la Raporto de la Konsilio de Eŭropo, la diverseco de lingvoj en la edukaj sistemoj de la membroŝtatoj, (laŭ enketo?) farita en 37 landoj, oni konstatas tion, ke nuntempe en preskaŭ 4 landoj el 5, unu lingvo estas lernata fare de nombro da lernantoj pli multe ol la totala nombro da lernantoj kiuj lernas ĉiujn aliajn lingvojn, kaj

Rememorante, ke la Itala Ministrejo de Eduko, en la cirkulero 126/10-04-95 priskribis per la sekvantaj vortoj la tiel nomitan Paderbornan metodon por la instruado de fremdaj lingvoj, *la lingvoinstrua kvalito de la internacia lingvo montriĝas tre interesa (...) funkcianta kiel lingva modelo, mezurunuo de lingvoj –por esti klara-lernite antaŭ iu alia fremda lingvo, ĝi faciligas –ŝparante tempon- la postan studadon de aliaj lingvoj kaj deklaris ke prepara studado de Esperanto estigis 25 % plibonigon en la alproprigon de la rusa lingvo, 30 % por la germana, 40% por la angla kaj eĉ 50 % por la franca ;*

Rememorante, ke la rezolucio prezentita okaze de la Dua Kongreso de la Federacio, subtenanta la starigon interne de la Eŭropa Parlamento de Komisiono por studi la diversajn solvojn de la problemo kiel parigi la sekurigon de la lingva ekologia sistemo kun ekonomia kaj demokratia komunikado, ne forlasante la hipotezon de adopto de Esperanto kiel eŭropa federacia lingvo, rezolucio kiun aprobis la Konsilantaro;

Asertas ke la anoncita malapero de 90 % de la lingva heredaĵo de la homaro ne nur estas kultura katastrofo, sed ankaŭ ekologia katastrofo kaj tial plene reprezentas krizon ekologian;

Invitas al la Konsilio de Eŭropo, al la Eŭropa Komisiono kaj al la eŭropaj registaroj, ĉu membroj aŭ ne de la Eŭropa Unio, kunvoki kiel eble plej baldaŭ unuan interregistaran Konferencon pri la stato de la lingva ekologia sistemo de Eŭropo, kunlabore kun la civila socio, kaj precipe kun la eŭropa kaj translandaj partioj, asocioj kaj Neregistaraj Organizoj;

Instigas al ĉiu membropartio, al la verdaj naciaj kaj eŭropaj deputitoj kaj al la verdaj ministroj ke ili subtenu tian Konferencon, kaj ankaŭ subtenu la starigon de Eŭropa Lingva Observatorio kiu konfirmu kaj kontrolu tion, kiom la eŭropaj lingvoj pereas – kaj precipe la malpli disvastiĝintaj- en la lernejo, en la socio kaj en la amaskomunikiloj;

Invitas al ĉiu membropartio, kaj interne de ili, al la deputitoj en la nacia aŭ en la Eŭropa Parlamento kaj al la membroj de aliaj regaj instancoj, kaj ankaŭ al la verdaj ministroj, disvastigi al la Ministro de Eduko – kaj al la aliaj koncernaj institucioj- de sia lando la enhavon de la itala cirkulero kaj subteni eŭropan eksperimentadon kaj konfirmon grandskalajn de la Paderborna metodo.

INTERNACIE

LITERATURA KONKURSO "LIRO-2002"

"La Ondo de Esperanto" invitas ĉiujn dezirantojn partopreni en tradicia literatura konkurso Liro-2002, laŭ jena regularo:

Liro-2002 havas kvin branĉojn:

- 1.- Originala prozo : ne pli ol 30 mil literojn longa
- 2.- Originala poezio: la amplekso ne estas limigita.
- 3.- Traduka poezio en la rusa lingvo: "Rastoĉitelj" de Fjodor Sologub
- 4.- Traduka prozo el la rusa lingvo: "Tamanj" de Miĥail Lermontov
- 5.- Traduka prozo el la angla lingvo: "The Lost Sanjark" de Saki.

En ĉiu el la originalaj konkursoj oni rajtas partopreni per ne pli ol tri verkoj. Bonvolu sendi tri tajpitajn, komputile kompostitajn aŭ tre klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de Liro-2002 (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja 1248, Ruslando). La konkursaĵoj devos atingi la organizantojn antaŭ 1 novembro 2002.

Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso. Oni ne rajtas sendi verkojn, kiuj jam estis publikigitaj aŭ premiitaj en aliaj konkursoj.

La originalajn tekstojn de la tradukotaj verkoj petu ĉe la sekretario poŝte kontraŭ afrankita koverto (por Ruslando) aŭ internacia respondkupono, aŭ elŝutu el la reto: <http://Esperanto.Org/Ondo>

La laŭreatoj de Liro-2002 ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La rezulto estos anoncita je la Zamenhofa Tago. La organizantoj rezervas al si la rajton ĝis 31 dec.2004 publikigi la ricevitajn konkursaĵojn en "La Ondo de Esperanto", libroforme kaj elektronike, kondiĉe ke ili avertos pri tio la aŭtoron ĝis 1 marto 2003.

STIPENDIOJ POR INTERLINGVISTIKAJ STUDIOJ

La Universitato de Adam Mickiewicz (UAM) en Poznan, la dua plej granda universitato en Pollando ofertas 3-jaran eksteran postdiploman studadon pri interlingvistiko. La internacia kurso okazas en la Lingvistika Instituto, sub la gvido de d-rino Ilona Koutny, membro de la Akademio de Esperanto. La Interlingvistikaj Studoj donas superrigardon pri ĝenerala kaj aplikata lingvistiko, fokusiĝas al internacia kaj interkultura komunikado, traktas planlingvojn kaj detale okupiĝas pri gramatiko, literaturo, kulturo kaj historio de Esperanto.

Surloka kurso (unusemajna sesio) okazos unufoje dum la semestro (fine de septembro kaj komence de februaro). La gestudentoj pretigos diplomlaboraĵon kaj post la fina ekzameno ricevos atestilon pri Interlingvistikaj Studoj.

Partoprenontoj povs aliĝi el la tuta mondo por la studjaro 2002/2003 ĝis la 15-a de aŭgusto 2002. Pli frua anonco estas bonvena.

Postuloj: fino de mezgrada lernejo (kun abiturienta ekzameno aŭ egalvalora) kaj bona scio de esperanto. Partoprenontoj devas plenumi orientigan teston antaŭ la komenco de la Studoj. Kelkaj stipendioj estas antaŭvidataj. Kotizo por unu semestro: 400 eŭroj (por nepagipovaj lando ĉirkaŭe 120 eŭroj).

Por pluaj informoj kaj aliĝilo kontaktu d-rinon I.Koutny: Lingvistika Instituto de UAM- ul.Miedzochodzka 3-5 PL-60-371 Poznan T: + 48-61 829-27-09 F: + 48-61 829-27-00 (sekretariejo) E: ikoutny@amu.edu.pl

La septembra sesio (23-27.09.2002) estas kunligita kun la semajfina kultura renkontiĝo ARKONES, same en Poznano, kiu post la intensa tutsemajna serioza laboro ebligas malstreĉiĝon (kun teatraĵoj, muziko, diskutoj, ktp) Se la studentoj bezonas lingvan perfektigon, ni pretas aranĝi superanivelan intensan lingvokurson (unusemajnan) antaŭ la septembra sesio kontraŭ kroma kotizo.

ESF ofertas stipendiojn al seriozaj studemuloj!

ESPERO, Internacia Humanitara Organizo

Kiel anoncite en nia antaŭa revuo, jen la nova projekto RD/18/01 pri rekonstruado de loĝejoj en Bosnio.

Laŭ oficialaj statistikoj de internacia organizoj en Bosnio, ĉirkaŭ 500.000 loĝejoj estis detruitaj aŭ grave difektitaj. Ili troviĝas tra la tuta lando kaj en ĉiuj urboj. Laŭ la bezonoj la rekonstruado progresas tre malrapide. Ĝi urĝas por la familioj kiuj deziras reveni al siaj loĝejoj, sed mankas al ili la rimedoj por ekkonstrui

En la vilaĝo de Slatina, proksime de Srebrenica, kiel ekzemplo, la internacia helpo konstruis somere de 2001, 50 domojn el totalo de 900 detruitaj kaj la programo finiĝis. Tial 850 familioj estas ankoraŭ senhejmaj kaj ankoraŭ bezonas helpon.

Laŭ rekonitaj normoj, la rekonstruado de loĝejoj inkluzivas la rekonstruon de la domo kaj de la tegmento, la instalon de akvo kaj elektro kun ĝiaj konduktuboj, la planko kaj la laboroj por refari kuirejon, banĉambro kaj unu ĉambro. Ĉi projektoj kutime kostas inter 5.000 kaj 25.000 eŭrojn.

Laŭcele kontribui eĉ modeste al tiom ampleksa programo, la estraro de *Espero* elektis dekon da projektoj inter la centoj da ricevitaj petoj.

La elektitaj petoj distribuiĝas tra la tuta lando de okcidento al oriento kaj de nordo al sudo. Temas aŭ pri kompleta rekonstruado de domo (ĉar la antaŭa estis entute detruita), aŭ pri parta rekonstruado aŭ pri restaŭro de la interno de detruitaj loĝejoj. Ĉiam temas pri privataj loĝejoj, kies posedantoj ne havas rimedojn por ekkonstrui ilin.

Ĉi tiu kampanjo celas vekigi la intereson kaj la solidarecon de privatuloj, familioj, malgrandaj entreprenoj aŭ humanitaraj organizoj por **ADOPTI KAJ PATRONI** la realigon de unu el tiuj projektoj.

Kiel ekzemplo ni prezentas la projekton por rekonstruo de la loĝejo de s-ro FETAH ZVIRAC el Sarajevo (mem aktiva esperantisto) kiu loĝis antaŭ kaj dum la milito


inter 1992 kaj 1995 en Sarajevo en la kvartalo Dobrinja, proksime de la tiea flughaveno. Li loĝis tie kun edzino kaj tri gefiloj en apartemento 80 m².

En 1992 lia loĝejo estis bombardita kaj detruita kaj restis nur la eksteraj muroj (vidu aldonan foton) kaj ili hazarde savis la vivon.

Nun ili loĝas en okupita ne propra domo, kiun baldaŭ ili devus forlasi. S-ro Fetah, estante tamen inĝeniero, enspezas salajron eĉ ne sufiĉan por la familia nutrado. Lia edzino ne laboras kaj la gefiloj estas studentoj. Memkompreneble ili ne povas rekonstrui sian domon sen ekstera helpo.

La rekonstruo de ilia loĝejo kostas entute 18.869 eŭrojn laŭ prezentita buĝeto.

Nia asocio alvokas siajn membrojn adopti ĉi tiun projekton kaj jam de nun pretas akcepti tiucelajn donacojn en sian konton: 2100-0461-90-0200055053 kun mencio "Loĝeja bosnia rekonstruo". Sur niaj venontaj revuoj ni mencios la donacintojn.



RECENZOJ

Baza Esperanta Radikaro, Wouter F. Pilger, UEA 2001, 110 x 180 mm. 160 paĝoj,

Ofte al Esperantisto nova, sed eĉ al sufiĉe sperta lingvouzanto, povas veni duboj pri la ĝusteco de iu vorto, precipe kiam ĝi similas al vorto de la propra lingvo. En tiuj kazoj oni povas konsulti vortaron Esperantan-nacilingvan, se tian vortaron oni havas kaj se ĝi estas sufiĉe detalan pri la diversaj signifoj de la vortoj. Sed eĉ pli bone estus konsulti vortaron Esperantan, kiu klarigu la signifojn uzante nur Esperantajn vortojn. La plej uzata el tiaj vortaroj estas PIV (*Plena Ilustrita Vortaro*). Sed PIV, krom esti multekosta do ne por ĉiuj havebla, estas dika libro certe ne poŝformata.

Similan rolon iel povas nun ludi tiu ĉi nova vortareto, kiu klarigas la signifojn de pli ol 2700 Esperantaj radikoj, uzante kutimajn kaj elementajn Esperantajn vortojn.

Ekzemple italo facile povas erari dirante "mi aŭskultis interesan konferencon", ĉar la itala "conferenza" signifas kaj "konferenco" kaj "prelego". Sed per tiu ĉi svelta libreto oni povas kompreni la veran enhavon de vorto, sen bezono trairi tra nacilingvaj esprimoj. Oni tuj trovas ke *konferenco* = *kunveno de (invititaj) fakuloj kaj spertuloj por interkonsiliĝi pri grava demando aŭ afero, dum prelegi = fari paroladon pri iu temo al grupo (klubanoj, studentoj...) aŭ publike*.

La difino per Esperantaj vortoj tuj kondukas al la signifo, transsaltante la nacilingvaj vortojn, kiu povus misvoĝigi, kaj helpas akiri la kutimon rekte pensi en Esperanto.

La aŭtoro verkis ankaŭ terminarojn zoologiajn kaj botanikajn, troveblaj en Interreto.

La *Baza Esperanta Radikaro* estas nepre konsilinda kaj al komencantoj kaj al progresintoj.

Umberto Broccatelli

La libro de la mirindaĵoj aŭ priskribo de la mondo, Marko Polo, Esperantigo de Daniel Moirand, UEA 2001, serio Oriento-Okcidento, 145 x 210 mm, 448 paĝoj.

Tiu ĉi libro estas konata al italoj per la nomo *Il Milione (La Miliono)*, sed ĝi estis nomata ankaŭ per pluraj aliaj titoloj, du el kiuj estas mem uzata kiel titolo de la Esperanta versio. La originalo de la libro estis verkita en malnova franca lingvo (nome la lingvo parolata ĝis la 13a jarcento inkluzive), forte miksitaj kun veneciaj kaj pizaj elementoj, tiel ke tiun lingvaĵon oni povas konsideri ankaŭ kiel ion mezan inter la franca kaj la itala.

Tre verŝajne Marko Polo diktis sian rakonton itallingve, dum sia militkaptiteco en Ĝenovo, al *Rustichello da Pisa*, kiu transkribis ĝin en la franca, kiu estis tiam konsiderata prestiĝa internacia lingvo.

La vojaĝoj de Marko Polo, kaj la priskriboj de li lasitaj, malfermis por la Okcidento la vojon al fora Azio, donis multajn sciojn pri la Mongola Imperio, pri nekonataj okazaĵoj kaj kutimoj, estis stimulo al aliaj postaj esploroj.

La tradukinto klopodas redoni la lingvon de la originalo, kun siaj stilaj kaj sintaksaj apartaĵoj, kaj inventas por Esperanto novajn vortojn, kiuj redonu la sencon de malnovaj italaj aŭ francaj vortoj entenataj en la rakonto. Tiuj "eksterkutimaj vortoj" estas listigitaj kaj klarigitaj en aparta ĉapitro.

Abundas notoj donantaj historiajn kaj geografian informojn. Enkadrigas la tuton detalaj biografiaj sciigoj pri la familio de Marko Polo kaj pri li mem, ekde lia junaĝo ĝis lia reveno de la vojaĝoj, la ŝiparbatalo apud la Dalmatia insulo *Curzola/Korĉula*, en kiu li estis kaptita de la ĝenovanoj, lia longa mallibereco kaj poste lia reveno hejmen.

Libro nepre tre interesa, kiu enmergas la leganton en alian epokon kaj en tute apartan stilon de Esperanta lingvaĵo.

Umberto Broccatelli

(recenzoj aperintaj en *l'Esperanto* la revuo de la Itala Esperanto-Federacio n-ro 3, 11 aprilo 2002, kiujn ni reproduktas kun la afabla permeso de la aŭtoro)